kiam okazis nur ordinaraĵoj. Do, por *ion* okazigi, ŝi laboradis per la dentoj ĝis de la kuko neniom restis.

* * * *
* * *
* *

## ĈAPITRO II

### La Lageto farita el Larmoj

"Neniam mi spertis tiaĵo" ekkriis Alicio, (pro eksciteco ŝi eĉ forgesis la akuzativon). "Jen mi plilongiĝas teleskope, kiel la plej granda teleskopo en la tuta mondo. Adiaŭ, piedetoj miaj! (Kiam ŝi direktis la rigardojn al la piedoj, pro la plilongiĝo ili jam fariĝis tute malproksimaj, kaj apenaŭ ŝi povis vidi ilin.)

"Ho, vi kompatinduloj! kiu morgaŭ vestos al vi la ŝtrumpojn kaj ŝuojn? Kompreneble ne *mi*; mi estos tro malproksime por okupi min pri vi; vi devos klopodi por vi mem. Tamen estas necese komplezi ilin; ĉar se ili ofendiĝos, ili eble rifuzos marŝi laŭ mia volo. Mi do en la kristnaska tempo donacos al ili paron da novaj botoj."

Ŝi eĉ elpensadis detale kiel ŝi faros la necesajn aranĝojn. "Mi pagos al la portisto por liveri ilin, kaj kiel stranga tio ŝajnos, sendi donacon al siaj piedoj! Ankaŭ la adreso estos tre stranga:

*Al lia Moŝto la Dekstra Piedo Alicia,*
*sur la Tapiŝeto*
*apud Fajrgardilo*
(*Kun amsalut' de Alicio*).

Ho, kian sensencaĵon mi parolas!"